

LA FUNDAMENTO
/Fermante la Zamenhofan jubileon/

Antaŭ mi kuŝas eta libro, entute 182-paga, kun flaviĝintaj folioj, titolita, modeste: FUNDAMENTO DE ESPERANTO. Aŭtoro: L.L. Zamenhof. Gramatiko, Ekzercaro, Universala vortaro en kvin lingvoj. Modesta, simpla. Kiel fonto de rivero, kaŝita ie en montara arbaro, kaj tamen, nepra origino de la granda rivero fluanta malsupre en la vasta regiono, komenco de multspeca vivo, de la montaro ĝis la maro, kein la fluo rapidas.

Ni aŭdu ĝian voĉon, puran kaj klaran, ni aŭdu la „Aŭtoron en la antaŭparolo: "Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu „plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia,, facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj nedetruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, „neniam tuŝebla kaj neniam sangebla FUNDAMENTO de la lingvo."

Oni ne povas esprimi pli simple kaj pli klare la esencon de la ĝisnuna ekzistado de nia lingvo. Ĉar tiu ĉi unua frazo neniel dogmatika, sed logika kaj saĝa, enhavas genian ideon, kiu haltigis plejparton de la esperantistaro antaŭ la paŝoj, kiuj detruis preskaŭ ĉiujn aliajn projektojn de internacia lingvo.

Konstrui la Fundamenton tiel, ke ĝi ne bezonu ŝanĝojn, tio estis la genia verko kaj en ĝi kernas la gloro de L. L. Zamenhof. En nenio alia. Post preskaŭ tri kvaronoj de jarcento Esperanto estas konata en ĉiuj partoj de la mondo en fakto unika en la historio de lingvistiko - unu sola idiomo, internacie parolata kaj komprenata.

La efektivigo, pri kiu la fondinto revis, estas hodiaŭ la plej reala kaj nerifuzebla argumento pri ĝusteco, de lia solvo.

Kaj en nia mondo, kie ne nur la oceanoj kaj lingvoj, sed ankaŭ la sociaj kondiĉoj disigas popolojn, Esperanto sin trovas inter tiuj bazaj mondaferoj, komunaj por homoj el ambaŭ sistemoj, kiel sociala problemo, tutmonda paco, scienco, arto, internacia sporto, ktp. Feliĉe venis Zamenhof kun lingvo sufiĉe frue, antaŭ la formiĝo de la du ĉefaj rivalantaj tendaroj. Neniu pli malfrua projekto atingis la rekonon en ambaŭ sferoj, kiun Esperanto jam havas. Tiu ĉi rekono en ambaŭ partoj de la dividita mondo, kaj ĝenerala reputacio „en la porpaca movado, /Daŭrigo sur la 2-a pago./



ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA Kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 1. Ve Smečkách 26, je la 20-a horo.

KOJETÍN-AMANASAKI pri la infandeseĝnaĵoj

Iniciate de la loka esperantista rondeto, la urba nacia komitato aranĝis interŝanĝon de infandeseĝnaĵoj kun la urbo Amanasaki /inter Kjobe, kaj Kioto/ en Jaganujo. Alvenis ĉirkaŭ tri cent deseĝnaĵoj, plejparte tre valoraj, el kiuj 120 oni elektis por la ekspozicio, malfermita en la Kultura domo en Kojetín dimanĉe, la 11-an de decembro 1960 je la 10-a horo.

La solenaĵon ĉeestis krom lokaj aŭtoritatuloj ankaŭ reprezentanto de la regiona komitato de la Komunista partio kaj reprezentanto de la Nacia fronto. Kiel honora gasto afable alveturis el Praha nia konata arniko s-ro KEI KURISU, japana verkisto kaj ĵurnalisto, lektoro de japana lingvo en la Karola universitato, kiu parolis esperantlingve. La ĉeĥan tradukon lerte prizorgis s-ano Mohapl. Samtempe en la malproksima urbo Amanasaki oni aranĝas similan ekspozicion de deseĝnaĵoj senditaj de ĉe- ĥaj geknaboj. Tiamaniere konatigis reciproke malgraŭ spaca kaj kultura distancoj, tiuj, kiuj eble en estonteco metos la fondostonon por la unuigita mondo. Tiun signifon kaj la klaran rolon de Esperanto dum tiu ĉi aranĝo substrekis la ĉefaj parolintoj. Pri tio ankaŭ raportis bilde la ĉeĥoslovaka televido en la unua eldono de siaj "televidadaj novaĵoj" merkrede, la 14-an de decembro 1960.

La Nacia komitato kaj la Esperanto-rondeto en Kojetín meritas dankon kaj estimon por sia serioza laboro, efektiviĝinta tiel trafe la ideon "per Esperanto al la mondpaco kaj kompreno inter la popoloj".
jmh

PRELEGO DE S-ANO HESAPĈIEV EN LERNEJO

Kun konsento de k-do Kubeš, direktoro de la mezlernejo en Smíchov, Vltavská strato, okazis la 3-an de novembro 1960 prelego de s-ano Hesapĉiev el Sofio, sub titolo "Bulgario - lando de rozoj". La prelegon partoprenis gelnantoj de 7-aj klasoj, kiuj nunjare lernos, dum geografiaj horoj, pri Bulgario, kaj samtempe anoj de Esperanto-Rondeto ĉe la menciita lernejo, por kiuj estis tiu ĉi prelego bona okazo aŭdi Esperanton kiel vivan, belsonan lingvon. Ĉiuj finaŭskultis la tutan prelegon kun intereso kaj ili ĉiam rememoras ĝin. La prelego estis bona propagando de la amika lando, kaj rezultigis, ke pluaj gelnantoj aliĝis al la Esperanto-Rondeto, kiun gvidas instruistino s-ino Milena Škodová. Ŝi ankaŭ la tutan prelegon tradukis en ĉeĥan lingvon.

M. Škodová

/Daŭrigo el la 1-a paĝo./

estas vera aktualajo de nia epoko, pro kio la esperantistoj posedas apartan lokon inter aliaj interesgrupoj. En epoko, kiam la dusistema mondo ne havas alian vojon krom du: aŭ kunvivadi en paco, aŭ pereji en atoma katastrofo, la lingvo de la varsovia okulkuracisto firme, neneŭtrale iras la unuan vojon. La homoj kunvivantaj bezonas kompreni unu la alian. Sed kompreni ne signifas opinii same, aŭ entute ne opinii kontraŭe, la esprimo mem jam entenas deklaron pri diverseco, kiu en la internacia vivo estas neevitebla. Tamen precipe la humanismaj ideoj de socialismo, la faktoj pri konstruado de societo, kie la popolo mem estas mastro de sia lando, povas esti diskonigataj helpe de la moderna, ĝenerala kaj neutrala interkomprenilo, kia hodiaŭ estas sole nia lingvo. Ne la ideoj, la faktoj, nur la LINGVA FUNDAMENTO estu NEŬTRALA.

Tiu ĉi modesta, lingva neŭtraleco, inda por ĉiu nobla humanisma tasko, estas super diversaj specoj de la "interna ideo" /de Zamenhof mem apartigita de la movado lingva/, kiun kelkaj postzamenhofaj filozofantaj esperantistoj deziris implanti al la movado, la fundamenta ideo, portanta la genian, tutan homaron koncernantan verkon de Lazaro Ludoviko Zamenhof, kies nomon UNESCO ĉijare enskribis en la liston de homoj, kiuj meritas estimon de la kultura mondo.
jmh

JUNAJ ESPERANTISTOJ EN OSTRAVA

Tradicia kunveno de junaj esperantistoj el regiono Ostrava okazis en Poruba de la 28-a ĝis la 30-a de oktobro 1960. Partoprenis ĝin ĉirkaŭ cent gesamideanoj.

La programo estis varia kiel ĉiu-jare. Apartan brilecon alportis prelego de s-ano Kei Kurisu "Pri Japanujo hieraŭ kaj hodiaŭ", okazita vendrede vespere. Per praktikaj ekzemploj respondas nia ŝatata japana amiko ankaŭ multajn demandojn de la publiko.

Sabate ni vizitis la lokan bild-ekspozicion kaj konatiĝis kun pluraj industriaj objektoj kaj memorindaĵoj de la urbo. La ĉefa amuza aranĝo fare de la junularo en Ostrava estis vespere en salono de la Kultura Domo en Poruba.

Antaŭe ni okazigis laboran kunvenon, kie estis pritraktataj du ĉefaj demandoj: 1. Problemo de la venontjaraj tendaroj/unu el ili okazu en Znojmo, ĉar ekzistas tia ebleco/. 2. Plueldonado de "Fajrero" sub la nova redakto /O.Kníchal/, se iu rondeto transprenos la administron. Poste evidentiĝis, ke ĉi tiun taskon kapablas plenumi Esp-Rondeto en Kolín.

Dimanĉe raportis s-ano D. Kočvara pri la E-seminario en Štířín, kiu estis precipe el vidpunkto politika serioza instruo por la partoprenintaj esp.-funkciuloj. Sekvis diskuto pri la novaj propagando-metodoj. Rezultiĝis, ke ĉiuj sukcesoj estas bazitaj sur agado de opaj rondetoj. Ankaŭ Esp-movado devas kontribui al evoluigo de la kultura revolucio en nia lando. O.Kníchal

REDAKTORON POR LA BULTENO DE I.G.E.L. serĉas Internacia Grafika Esperanto - Ligo, Insulindeweg 158 Amsterdam 0, Nederlando. Ĝisnuna redaktoro F.B.E. ten Hagen, kiu dum 12 jaroj sukcese redaktis tiun unikan bultenon, ne plu povas daŭrigi la laboron. Ĉu ni trovos ofereman samideanon, kapablan daŭrigi en la laboro? Malapero de Bulteno de I.G.E.L. estus granda kultura perdo.

ESPERANTO RONDETO ĉe Kulturdomo en Ostrov nad Ohří anoncis malĝojigan sciigon, ke ĝi pro manko de konvena loko provizore devas ĉesigi sian regulan funkciadon. Estas espereble, ke tiu ĉi situacio ne daŭros longe. Adreso de la sekretario estas: Jindřich Brankytl, ĉp.985/27, Ostrov nad Ohří.
J.S.

GRAVA PERDO POR ESPERANTO

Kun doloro ni en la antaŭa monato notis la malĝojan sciigon pri morto de eminenta esperantisto
Prof. D-ro GIORGIO CANUTO

kiu forpasis en Torino la 29-an de oktobro 1960. La mortinto estis ne nur unu el la ĉefaj personecoj en la Esperanto-movado, kiel prezidanto de UEA, sed ankaŭ homo ŝatata en kaj ekster siaj patrujo, sciencisto de unua rango. Ĉeĥoslovakaj esperantistoj perdas en li sinceran amikon.

Estu bonorigita lia memoro!

jmh

PRI LA ESPERANTA ANTOLOGIO

Kiel ĉiuj scias, estis eldonita Esperanta Antologio en Stafeto-eldonejo. Sian gravecon por ni, esperantistoj, bone mencias William Auld en la enkonduko, en kiuli skribas:

"Nuntempe ĉiu kultura grupo havas siajn antologiojn. Ekzistas trafaj agumentoj kontraŭ poemantologioj; tamen en certa etapo de la kulturevoluo antologioj faras gravan servon.

La esperantista popolo preskaŭ ne konas sian poezian heredaĵon. En naci-lingvaj lernejoj la junuloj lernas almenaŭ kelkajn poemojn. En esperanto-kursoj oni lernas maksimume LA ESPER-ON kaj eble, en esceptaj okazoj, unu aŭ du aliajn poemojn de nia Majstro, kaj fino. Mi esperas, ke tiu ĉi antologio donos al la esperantista popolo ĝian minimuman kulturbazon. Mi esperas, ke de nun oni rigardos samideanon, kiu ne konas la ĉefajn poemojn en ĝi, kiel senhontan needukiton au analfabeton." Grandega vero, sed kiom da tiuj libroj estas en Ĉeĥoslovakio? D-ík

ATENTIGO!

En la unua kunveno dum la 44-a UK en Varsovio estis fondita la Internacia rondo de arkitektoj, konstruistoj kaj personoj laborantaj en konstru-entreprenejoj. Kiu en Ĉeĥoslovakio interesiĝas pri pli detalaj informoj aŭ pri la formo de kunlaborado, bonvolu skribi al jena adreso: Osvětový ústav Blanická 4, Praha-Vinohrady, ĈSSR" .

MONTODOMO "ESPERANTO"

Apud la ĉefurbo de Bulgario sur monto Vitosa, la esperantistaro komencis konstrui montodomon. Ili ajnpenojn helpas Fako "Arbaraj Parkoj" Se komunumo, ellaborinte la arkitektajn planojn kaj liverante la konstrumaterialojn. Ĉiudimanĉe 20-30 geesperantistoj helpas la dungitajn de la esperantista konstrukomitato masonistojn, por ke la domo estu kiom eble pli frue preta. Ĝis nun pli ol dek geesperantistoj laboris pli ol dek tagoj senpage. La laboron ankaŭ partoprenos geesperantistoj el Sovetunio, Pollando, Hungario kaj Svedio. Multaj gesami-deanoj donacis pli ol unutagan sian salajron por la finkonstruo kaj mebligo de la domo. Italaj kaj svedaj geesperantistoj ankaŭ finance kontribuis.

Ĝis nun la esperantistaro elfosis pli ol 130 kubometrojn da teramaso kaj kolektis 90 kubometrojn da ŝtonoj.

En la printempo 1961 la montodomo ekfunkcios. Tiam je dispono de la esperantistaro estos la tuta domo, granda 145 kv. metrojn, situata en pitoreska ĉirkaŭaĵo je 1350 m super la mara nivelo. Tie oni organizados: feriojn, seminariojn, kursojn, prelegojn k. a. esperantoaranĝojn. Ankaŭ funkcios biblioteko kaj konstanta ekspozicio. Oni jam kolektas librojn kaj esperantaĵojn por ili. Se vi povas, sendu ankaŭ vi tiajn al adreso: Montodomo, p.k.44, Sofio, Bulgario.

La montodomo "Esperanto" efektivigata okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, estas inda kaj efika monumento de la aŭtoro de Esperanto.

Nik Nikolov, UEA-delegito pri turismo, Bulgario

LA ESTRARO DE TEJO eldonos en Bulgario ampleksan kantaron kun muziknotoj. Kunlaborantoj en ĉiuj landoj estas serĉataj. Sendu kantojn kun muziknotoj al: Nik Nikolov, p.k.44, Sofio, Bulgario.

jmh



Nigra elefanto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo

J. Šustr:

En la pasinta numero de nia Bulteno mi invitis nian karan legantaron halti en strato Týnská, en la proksimeco al nia biblioteko, kaj foliumi kun mi en la historio de ĉi tiu antikva loko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ne estis hazardo, ke la nomo de la ĉeĥa reĝo Karolo la XV-a venis al nia menso unualoke. La strateto Týnská estas tre mallarĝa. Certe pli mallarĝa, ol ĝia samnoma

stratetoj kiu ĝuste ĉe nia domo debranĉigas direkte al la strato Dlouhá. Nian bibliotekon oni eniras rekte el la strato. Se vi volas en tiu loko transiri nian straton por veni al ĝia kontraŭa flanko, vi povas fari nur kvin paŝoj. Nur kvin normalajn, ne tro longajn paŝojn. Ĉe la sesa vi jam kunpuŝiĝus kun unu el la fortikaj pilastroj, kiuj apogas la murojn de gotikstila preĝejo de Dipatrino antaŭ Týn ... kaj tia agn, ere ni venis al tiu karmemora ceha reĝo Karglo la kvara. Li estis ja fondinto de ĉi tiu granda, impona sanktejo, estis li, kiu ordonis konstrui ĝin ĉi tie en la lastaj jardekoj de sia vivo. Karolo kutimis inspektadi la konstrulaborojn. Ho, kiom da tempo pasis jam de tiuj okazintaĵoj el la 14-a jarcento! La reĝo observadis la konstruadon de ĉiuj flankoj kaj de sur ĉirkaŭaj ŝtonaj domoj. Eble li staris ĝuste en la domo, sur kies originaj romanikaj fundamentoj staras la "Nigra Elefanto". Sed ĝi havis tiutempe alian nomon. Ĝi estis nomata domo "Ĉe Ĉielarko". Tiu domo, konstruita el blankaj ŝtonoj, estis tiam, en la tempo de parolo, jam tre malnova! Eble la teretaĝo de tiu parto, en kiu situas nia biblioteko, devenas ankoraŭ el tiu epoko, ĉar ĝian plafonon portas ogivaj ripoj de pura, gotika stilo. Karolo ne finkonstruis la preĝejon. La konstruado estis interrompita dum husanaj militoj, kaj nur post proksimume 100 jaroj estis finita. Ni staras en la ombro de ĝiaj majestaj turoj. Unuavide ili ŝajnas esti samaspektaj. Sed se vi atente ilin komparas, vi konstatos diferencojn similajn al tiuj, kiujn vi vidas ĉe Sankta Georgo kaj ĉe multaj aliaj duturaj preĝejoj mezepokaj: Dum "Adamo", la maldekstra turo, estas svelta, gracitalia, ĝia kunulo, aŭ kunulino "Evo", do la turo dekstra, estas pli

dika, pli korpulenta. Precize laŭ mezepokaj kutimo kaj ideo pri la inaj belformoj! La epoko de gotika stilo kun maldikaj asketaj formoj, tamen preferis proporciojn pli plenajn, pli sukhavajn ĉe virina korpo. Tiu tura paro antaŭ nia biblioteko multe „superstaras la altan preĝejon kaj ĉirkaŭajn domojn. Jam kvin jarcentojn tiuj turoj rigardas al la Malnovurba Placo.

Ili estas unu el la multaj ĝiaj ĉefaj vidindaĵoj. Kiom da scenoj, historiaj okazintaĵoj kaj eventoj ili ĉi tie vidis. Kiom da festoj, solenoj, dolorplenaj masakroj, humiligo de nia popolo, kaj ĉiam novaj levigoj al la pli granda kaj pli feliĉa estonteco. Sed ni revenu al la fondinto de la preĝejo. Kiom da tiaj konstruveloj restis al ni el la tempo de lia regado... multaj preĝejoj, kasteloj, la katedralo, la ŝtona ponto ... Ĉu vi iam pensis pri tio, ke Karolo estis kreinto de panoramo, kiun ĉiuj ĉeĥoj tiel ŝatas? Rigardu nur la panoramon de Praha. Certe vi havas ĝian bildon hejme sur la muro, malgraŭ, ke vi povas vidi ĝin ĉiutage en la originalo. Kio faras la panoramon de Praha plej bela? Supre la majestata katedralo, kaj malsupre la ponto de Karolo eminentaj verkoj de arkitektoj Petro Parlér kaj Mateo de Arras, kiujn venigis ĉi tien Karolo mem.

Ernesto de Pardubice, la ĉefepisko po, certe celebrus meson memore al Johano Lucemburga - la patro de Karolo. Estas hodiaŭ la tago de sankta Rufo - la 26-a de aŭgusto. En la jaro 1346 pereis tiutage apud Crécy en Flandroj lia patro Johano, helpante en la batalo al sia parenco, la franca reĝo Filipo, kontraŭ angla Eduardo. - Tiuj tri plumoj de vulturo, kiujn havas la angla reĝa familio en ĝia blazono, devenas de ĉi tiu malfeliĉa okazintaĵo. Estas tiuj tri plumoj vulturaj, kiujn sur sia kasko portis la blinda ĉeĥa reĝo Johano.

Vivis en Praha samideano, kies vizaĝo treege similis al la vizaĝo de reĝo Karolo la IV-a, kiun ni konas el multaj bildoj de Karola epoko. Estas mirinda afero. Dum la 13-a Universala Kongreso de Esperanto en Praha /1921/ ni prezentis teatraĵon - "Nokto en Karlštejn" de Jaroslav Vrchlický, en la traduko de nia membro profesoro Miloš Lukáš. Rolon de reĝo Karolo ludis samideano Bunzel. Estis li, kies vizaĝo tiom similis al vizaĝo de Karolo. Lin maskisto ne devis ŝminki! Ĉu vivas ankoraŭ tiu samideano?

Praha, la 26-an de aŭgusto 1960.

ESPERANTISTA BIBLIOTEKO EN LA CENTRO DE PRAHA

Jam dum duonjaro troviĝas en mallarĝa strateto Týnská, kondukanta al la malnovurba placo, en historia domo n-ro 3 la biblioteko de Esperantista Klubo en Praha, fakrondo de Kulturcentro de ONV Praha I. Estas en ĝi kolektitaj pli ol 4.000 diversaj titoloj de esperanta literaturo, kio envicigas ĝin inter la plej grandajn esp. bibliotekojn en la mondo. La ejo, kies enirejo estas alirebla rekte el la strato, estas malfermata regule ĉiutage de la 16-a ĝis la 18-a horo. Vi povas viziti ĝin ĉiutage, kio memkompreneble ne estas regule - ĉar ĝia ĉiutaga malfermo dependas de libera tempo de niaj kunlaborantoj. jmh

NORDA PRISMO

Numero 1-2/1960 enhavas slovakon popolkanteton "Sopiroj" en la traduko de V. J. Dolinský. - Verketo de J. Štván

"Novaj urboj en Britujo", tiu artikolo aperis siatempe en ĉeĥa geografia revuo "Lidé a země", esperantigita de nia membrino Jana Cíhová, ĝi aperis en la sama kajero de Norda Prismo. En tria numero ni legas en esperanta vesto de Jiří Kořínek, poemon "Dum babilvizito" de K. V. Rais, kaj fine sur la paĝoj de tiu numero ni povas legi la enkondukon, kiun verkis hungara verkisto kaj poeto Julio Baghy pri nia membrino Eli Urbanová, al ŝia po-emarkolekto "Nur tri kolorojn", kiun eldonis la Ŝtafeto. Jen soneto per kiu Julio Baghy finas sian enkondukon:

Vi, kara fratin' sur kamp' poezia,
kun ruĝo de roz' kaj blanko lilia
aperis por ĉarmi, revojn disŝuti...
Mi, bardo maljuna, povas nur muti
kaj mire jubili pri pompa florigo
de juna talent' parenca en riĉo
de sentoj kaj ritme pensoj muzikaj...
En versoj vi vivas. Per mozajkaj
pentraĵoj de l' koro volu fideli
al lingvo, al lir' por ravi nin, Eli!

J. Š.

OKAZE DE LA 45-a KONGRESO DE OBA en Bruselo 1^60 gajnis en la tradicie Belarta konkurso la unyag kaj la duan premion por la poezio ceno kaj slova- ko, nome Jiří Kořínek el Brno kaj d-ro L. Izák el Martin. Pri tio ni jam alportis la sciigon en la lasta numero. Nun ni aperigas la poemon, kiu en la monda konkurso konkeris la unuan premion:

ROMANCO F-MAĴORA DE BEETHOVEN

La najvesper' al ĝi kulisas...
En mia ombro nigriĝanta
viziti venas min plej granda
el majstroj kaj la belo glisas tra vespera hor'
La arĉ' kantigas violonon
rakonti pri sopir' tenera
kaj trafas ĝia sorĉ' konkera
eĉ vin, trinkanta artodonon
ho, soifa kor'.

Sur plankon de malhela ĉambro
trancenda mano ĵetis rozon,
mi aŭskultante virtuozon
flaras, ke bonodoras ambro,
spiras roza flor'

La strata lampo pentras ombre
sur ĉambra vando bildojn strangajn,
mens' mia flustras vortojn dankajn
al muta mask' pendanta sombre
en titana glor.

Jiří Kořínek

FOR LA A- KAJ H-BOMBOJN!

Tion celas la modesta, sed bele e-kipita 31-paĝa broŝureto sub la titolo "La Belan Pacon" de japana aŭtoro Senzi Yamaguti, esperantigita, de Ter. Isiguro, eldonita zorge de "ĵaŭda Rondo", Sugamo 7-1662, Tosimaku, Tokio, 1959. La verketo enhavas la kor- kaj anim- skuajn travivaĵojn de la aŭtoro. Li persone kiel 14-jara knabo spertis la kriman' atombombadon de japana urbo Nagasaki fare de Usono fine de la dua mondmilito. Taŭga helpilo en la batalo por la paco kaj kontraŭ la diablaj termonukleaj armiloj.

Havebla ĉe la Japana Esperanto-Instituto, Motomati 1-13, Bunkyoku, Tokio, Japanujo. -it-

PAROLAS VARSOVIO!

Okaze de la miljara jubileo de la Pola ŝtato eldonis Pola radio belan faldfolion pri la programo de la elsendoj en Esperanto.

PACO - N-ro 82, Islanda eldono, septembro 1960. El la diversspeca enhavo speciale interesa estas la protokolo el la kunveno de MEM okaze de la 4-5-a kongreso de UEA en Bruselo la 2-an de aŭgusto 1960, plue artikolo de Taŭ Tauĵan "Ŝvito kaj larmoj" pri teruraj postsekvoj de atombomboj en Japanujo. Esperantista rondeto ce fervojista uzina klubo en Havlíčkův Brod kontribuis per mallonga porpaca epizodo el la libro "Tie transrivere estas Argentino" de Hanzelka kaj Zikmund. La ĉefartikolon "Islando kaj la neŭtraleco", kiu priskribas senlacan batalon de la islanda popolo kontraŭ partopreno en NATO, verkis Oskar Ingimarsson. La numero estas riĉe ornamita per poezio de aŭtoroj el diversaj landoj, havantaj komunan temon - pacon, vivon, feliĉan estontecon de la homaro.

jmh

ATENTIGO!

Presitan ilustritan monatan gazeton PACO, organon de MEM, kies unuopaj numeroj aperas en diversaj landoj, oni povas antaŭmendi je la adreso: Esperantista rondo de Závodní klub ROH Závodů V.I.Lenina, Plzeň, Kopeckého sady 13. Jarkotizo estas Kčs 20,-.

GRAVA ATENTIGO POR ABONANTOJ DE NUNTEMPA BULGARIO

Administrejo de Nuntempa Bulgario anoncis en n-ro 10, ke ekde nun nur ĝiaj ĝeneralaj reprezentantoj, po unu en ĉiu lando, povas akceptadi abonpagojn por la jaro 1961. En nia lando la sola distribuanto de eksterlandaj gazetoj estas gazetejo ORBIS, Praha 12, Stalinova 46, kiu escepte akceptas abonojn por Nuntempa Bulgario, se ili venos en proksimaj tagoj! La prezo por unu jarkolekto estas nun iom plialtigita - 18,- Kčs. Abonpagoj senditaj al s-ano Šustr, komisiito de Bulgara Kulturo, estos resendataj al la pagintoj, kiuj estas petataj denove abonigi ce Orbis, ĉar pro diferenco de la prezo ne estas eble amase transdoni la jam kolektitajn abonojn al la nomita entrepreno. Krome oni intervenos ĉe Orbis, ke ĝi akceptu tiajn malfruiĝintajn abonojn. Bonvolu nepre certigi al vi regulan alsendadon de tiu ĉi plej luksa esperanta revuo.

Redakcio

NI SENDAS SALUTON



al nia plej longdaŭra membro, samideano Rudolf HROMADA, kiu la 9-an de novembro 1960 ĝisvivis sian 70-an jaron. Ĉe iu okazo ni rememoras lian fruktoriĉan karieron de esperantisto. En la movado kaj en la Praga Klubo li aktivis jam ekde sia frua junaĝo /1907/. Jam en tiuj antaŭmilitaj jaroj montriĝis, ke li traktas la ideon de la internacia lingvo serioze kaj ke li ludos ne malgrandan rolon inter la ĉeĥaj esperantistoj. Sed nur post la unua mondmilito disvolviĝis lia organiza talento, precipe en la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, kies li iĝis ĝenerala sekretario /1920/. Kun Bouška li fondis ĉeĥoslovakon Gazeton kaj poste en la jaroj 1923-1935 li eldonadis gazeton La Progreso, kun alta nivelo lingva, literatura kaj informa. Ankaŭ en la internacia movado Hromada aktivis tre vigle kaj estis longjara komitatano de UEA, ja eĉ membro de la Internacia Centra Komitato /en la jaroj 1924—1930/. Post la dua

mondmilito, kiun li grandparte pasigis en la koncentrejo, li starigis inter la gvidaj funkciuloj de la ĉeĥoslovaka movado kiel vicprezidanto de la Asocio.

Lia longjara aktiveco sur la kampo lingvistika, lia natura talento, lia funda kono kaj praktika sperto igis

lin taŭga kaj fidinda kompetentulo pri nia lingvo. Liaj meritoj estis rekonitaj ankaŭ internacie, kiam li farigis lingva Komitatano /Akademiano/. La akiritajn konojn de lingvisto li transdonadis al multaj novaj adeptoj de Esperanto, precipe per instruaj tekstoj en la gazetaro. La iamaj aŭskultantoj de la Verda Stacio en Praha tra la vasta mondo rememoras la trankvilan voĉon de Hromada, parolisto kun modela klara prononcado.

Altan valoron poezian havas liaj sennombraj tradukoj el la moderna ĉeĥa poezio, kiun li interpretadas per lingvo sentema kaj kulturita. Liajn versojn ni nemalofte aŭdis en la Praga Klubo kaj ĝis nun povas ilin legadi en la gazetaro /lastatempe en la Nica Literatura Revuo/.

Grandan talenton kaj bonŝancan manon Hromada montris ĉe traduko de tekstoj por kantoj kaj arioj. Sed plej konata kaj fama li fariĝis per siaj laboroj leksikologiaj. Liaj vortaroj esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-esperanta, kvankam nur poŝformataj, enhavas taŭge kaj celkonscie elektitan vortmaterialon kun fidindaj tradukoj. En ili respeguligas la rezultoj de liaj tut-vivaj spertoj, studoj kaj laboroj. Ankaŭ la vortaro, kiun nur. preparas la ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, estas verko de nia jubileulo.

Ni deziras al li longajn jarojn de sano kaj trankvila vivo kaj ankaŭ multajn fruktojn de lia poresperanta laboro.

Tomáš Pumpř

ĜOJIGA MOVAĴO EL RIGA /Latvia SSR/

Kie konstruiĝis nova klubo de esperantistoj ĉe domo de Arto, Valnu iela 9, Riga, Latvia SSR, USSR. La klubo tre interesiĝas pri la metodoj de klubaj laboroj kaj funkciado en aliaj landoj. La esperantistaj kluboj kaj rondetoj estas petataj skribi al supre donita adreso. Ankaŭ individua korespondado estas dezirata. J.Š.

NUNTEMPA BULGARIO

N-ro 10 enhavas grandan artikolon titolitan "Komenský pri Lingvo Internacia" de konata ĉefa komenologistino D-rino V.T. Miškovská, kiun la nomita verkis speciale por la revuo. La tradukon bonege faris Jana Cíhová. La artikolo estas diskutinda en la kunvenoj. jmh

KLACEMA OBSERVANTO: "LA TEGMENTO"

Estimataj kamaradoj-samideanoj estas jam urĝa tempo, ke ni estu sub la "tegmento". Oficiale agnoskitaj, oratore paroladis parolema Ade Kefarant, ni estas ja kiel orfoj disigitaj en diversaj uzinklubaj kaj klerigdomaj rondetoj. Pilkludantoj bezonas la pilkon por ekzerci por sama celo, ekzerci ni bezonas gazeton. Ĉu vi vidis iam iun redakcion sub ĉielo? Neniarn! Tiel mi deklaras: "Ni urĝe bezonas oficialan tegmenton".

Aplaŭdo. Jes, bonege, ĝi bezonas tegmenton skandale vokas ĉeestantaro. La pli agaj sinjorinoj ĉesis triki kaj fliki ŝtrumpojn, kluba kunveno ja fariĝis interesa, dank' al Ade Nefarant. Li certe volas funkcion ili opinias. Kelkaj dormantaj geuloj vekigis. Jes, tegmenton ankaŭ ili vokas, kvankam ili ne scias pri kio temas. Tegmento estas ja utila ili pensas, ĝi ŝirmas kontraŭ pluvo, dum senvarmo sub ĝi estas kvieta ombro, eĉ dormi oni povas,

Kaj unuvoĉe estis akceptita postulo "havi tegmenton". Kaj denove ekdormis dormemaj geuloj. Depost tiu memorinda kunveno pasis kelka tempo. "Tegmento" estis konstruita Kaj sub ĝi oni ankoraŭ pli trankvile dormas kaj estas interese - ke eĉ "la tegmento" trankvile "dormas".

Ade Nefarant depost tiu tempo ne aŭdigis plu. Li ja havas funkcion.

LA KLUBA LABORO

"Kara, la klubaj kunvenoj estas netolereblaj, sen suko, malinteresaj, kredis, mi ne plu venos."

"Nu, kaj per kio vi atribuas al kunveno?"

"Mi? Kial atribui? Ni havas ja funkciulojn!"

"Kial do vi ne fariĝis funkciulo?"

"Iu, ja devas kritiki, ĉu ne? Jes, devas esti konstruiga kritiko, ne la laŭdo sed la kritiko helpas."

"Jes, sed ĉu via kritiko estas objektiva?"

"Objektiva? Ĉu oni povas objektive toleri enuon?"

"Kritiku publike en kunveno!"

"Kion vi diras, oni donas al mi funkcion kaj mi devus labori. Kritiko ja estas pli facila."

A.S.

DEZIRAS KORESPONDI

A U S T R I O ;

= ANTON SGHILLING, Hainburgerstrasse 56/3/33, Wien III/40 kaj 1a filo 15- jara-Karlo dez.kor.k. inters.BK k.PM. = RUDOLF PEKNY, Quirinplatz 10-12/10/7 Wien 10, inters. bildkartojn.

B U L G A R I O :

= SAVA ST. NJAGOLOV, str.20 april 36, Sofio, inters. PM kaj PK.

Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O :

= MILOŠ URBAN, Palackébo 27, Děčín IV, kor. pri ĉ.t.,inters.PI.Glum.,let.lib.

= V. KIBALČIČ, Tichý Potok, p.Brezovica nad Tor.,volas inters.GRANDAN VORTAR- ON ceb.-esp. de Filip je libro ESPERANTA KURSO de Andr. Cseh - eld. I. E. Instituto en Haag, 1957j.

G E R M A N U J O :

= "VERDA AMIKECO"-Junularrond./16 gis 24-jar./,ĉe Klaus Urban, Bodenbacher- Str.28,Dresden A20,kor.pri popolarto, Esp.ktp.,inters.PK kaj esp.-aĵojn.

H I S P A N U J O

= A.MARTIN,CLL Lope de Vega N-ro 14b,

P.N. Barcelono 5, inters. PM.

V I E T N A M I O :

= PHAM-CHUNG, 5 Str. Chan-Cam, Hanoi, dez. kontaktiĝi kun mebla teknikisto.

EKP kaj LA REDAKCIO de BULTENO

sendas al ĉiuj ĝiaj amikoj kaj legantoj

SINCERAJN BONDEZIROJN EN LA NOVA JARO 1961

BULTENO, informilo de Esperantista Klubo en Praha de Kulturcentro de ONV Praha 1, eldonas: Kulturcentro ONV 1. Respondeca redaktore: J.M.. Havlík, Plamínkové 12, Praha 7, tel. 73637.